# Tamen Plu

**Oficiala organo de**
**Esperanto en Sudaŭstralio.**
**Legeblas ankaŭ interrete**
**http://home.iprimus.com.au/esperantobob/**

**Bonestu sendi ĉiun korespondaĵon al:**
**6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A. 5019, aŭ al**
**esperantobob@iprimus.com.au**

**Bonestu ne forgesi de tempo al tempo atente rigardi tiun ate de Paŭlo konstante ĝisdatigatan ligilon al la 21a Somerkursaro de AEA: www.thebegavalley.com/1468.0.html**

**Redaktanto: Bob Felby** **Majo 2005**
**Telefono: (08) 8242 1460** **Jarkolekto 24**

# Edukado

**Se vi vere volas lerni kiel senerare uzi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: ”Lingvaj Resondoj”.**

**La ĉefverko de la jam fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitatas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

## Gravaj Esperanto-eventoj:

**Merkredon la 4an de majo ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**
**Merkredon la 18an de majo ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**
**Sabaton la 21an de majo ni okazigos teatraĵojn ĉe Pat, 4/28 Hampton Street North, Goodwood, 5034. Ni kunportos ion manĝeblan!**

**Merkredon la 1an de junio ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**De vendredo la 10a ĝis lundo la 13a de junio ni okazigos Vintrokursaron por komencantoj kaj progresintoj en "Clarendon Park Community Centre", ĉe la angulo de East Avenue kaj Canterbury Tce, Black Forest, vidalvide al la fervojstacidomo de Clarence Park.**

**Merkredon la 15an de junio ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Merkredon la 15an de junio ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Merkredon la 6an de julio ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Merkredon la 20an de julio ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**La 90a Universala Kongreso de Esperanto okazos de sabato la 23a ĝis sabato la 30a de julio 2005 en la belega urbo, Vilno, Litovujo.**

**De dimanĉo la 31a de julio ĝis dimanĉo la 7a de aŭgusto 2005 okazos la 61a Internacia Junularkongreso en Zakopane, Polujo.**

**Merkredon la 3an de aŭgusto ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Merkredon la 17an de aŭgusto ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Merkredon la 7an de septembro ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Merkredon la 21an de septembro ekde la 18a horo okazos Esperantumado en la Komunumejo, 176 Tynte Street, Nordadelajdo, kie ĉiuj bonvenas.**

**Sabaton la 24an de septembro ni okazigos ekskurson al Haveno Viktoro. Detaloj sekvos!**

**La 11an de decembro ni festos la 146an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof ie, la loko ankoraŭ ne decidatis, sed ni festos de posttagmezo ĝis vespero.**
**Ĝuu 13 tagojn da intensa studado de la internacia lingvo, Esperanto, dum la 21a Somerkursaro/kongreso de AEA. Travivu amikajn aktivecojn kaj Esperanto-kulturon plonĝante en la lingvon ekde la 15a ĝis la 28a de januaro 2006 en ”Kianinny Cabins”, Tathra Road, Tathra, NSK 2550, ĉe la sudorienta marbordo de Novsudkimrujo.**
**La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.**

# Vizito al Nepalo

**Mi intencis ĉeesti la 4an Azian Kongreson en Nepalo de la 4a ĝis la 8a de marto 2005.**

**Ĉar mi volis ankaŭ iom grimpi sur la Anapurnajn montojn, mi kontaktis vojaĝagentojn por fari ekskurson post la kongreso al la montoj, kaj al Ĉituan Nacia Parko.**

**Post fina pagado de la kongreskotizo, flugbileto kaj ekskurso, okazis krizo en Nepalo, ĉar la reĝo de Nepalo decidis eksigi la tutan registaron.**

**Tuj poste la KAEM (Komisiono Azia Esperanto-Movado) decidis ŝanĝi la daton de la kongreso al aŭgusto, sed la vojaĝagentoj ne volis ŝanĝi la ekskurson, do kion fari? Se mi ne iros mi perdos multe da mono; mi finfine decidis tamen iri nur por la ekskurso unu semajnon post la originala elirdato.**

**Intertempe oni decidis tamen havi la kunvenon de la 4a ĝis la 8a de marto kiel antaŭkongreson sen sciigi min! Tio signifis ke mi alvenis al Katmanduo kiam preskaŭ ĉiuj (partoprenantoj kaj lokaj esperantistoj) jam antaŭkongresis kaj estis for ekskursante.**

**Tamen estis bona surprizo ekstere de la katmandua flughaveno vidi afiŝon kun mia nomo sur ĝi kaj afabla nepala esperantisto bonvenigis min kun oranĝa florĉeno!**

**Mukunda C. kaj Kanchan iom montris al mi la Thamel-distrikton en Katmanduo, kie multaj eksterlandanoj loĝas, kaj kie troviĝas ankaŭ ilia ”Esperanto-Domo” sur la 4a etaĝo.**

**La sekvan tagon (sabato) mi tie renkontis multajn gejunulojn, kiuj venis por lernado de Esperanto. Oni poste klarigis al mi ke Nepala Esperanto-Junulara Organizo (NEJO – stariĝis en 2003) havas ’nur’ 50 membrojn, kaj eble ’nur’ 15 el ili vere laboras por la movado!**

**Mi ne menciis ke en Aŭstralio nia junularo nombras eble 20 kaj nur 5 vere aktivas!!**

**Junulo Navaraj (okmonata esperantisto) gvidis min tra la fama Durbar Sq. klarigante pri la historio de la konstruaĵoj k.a. en sufiĉe bona Esperanto. La sekvan tagon mi vojaĝis kun la ekskursgrupo al Pokhara kaj de tie ni grimpis sur la montojn dum 6 tagoj. Estis tre bele, la freŝa aero, la grandaj rododendroarboj, kaj multaj vilaĝetoj tra kiuj ni pasis.**

**Bedaŭrinde, kiam ni venis al la plej alta punkto de la vojaĝo por spekti nekredeblan 180° montvidaĵon ... pluvegis – ni ne povis vidi 2 metrojn antaŭ ni!**

**De Pokhara mi iris parte per ege malbona vojo (iri aŭtomobile 35 kilometrojn daŭris pli ol 3 horojn!!) al la nacia Parko de Ĉituan. Estis varme tie kaj mi restis en luksa kabano kun bonega manĝaĵo. Mi iris per elefanto tra la ĝangalo por vidi sovaĝajn bestojn kaj aliajn. Mi ne vidis la faman tigron nek leopardon, sed vidis aliajn interesajn bestojn kiaj rinoceron, bradipan urson (sloth bear), ghardian (nepala krokodilo), mungojn, pitonon, simiojn, diversajn cervojn kaj multajn birdojn. Estis ege bona sperto tiu vizito en la parko.**

**Reveninte al Katmanduo mi provis kontakti la esperantistojn. El kvar telefonnumeroj neniu respondis! Sed post multaj horoj mi hazarde kaptis la sekretarion de Nespa (Nepala Esperanto-Asocio) Bharad Ghimire, kiu tuj decidis esti mia gvidanto! Dum du tagoj mi vojaĝis kun li kaj juna esperantistino Apsana por vidi la malnovajn urbojn de Patano, Bhaktapuro kaj poste ni vojaĝis al Nagarkot, kie ni tranoktis kaj surgrimpis monteton por vidi Monton Evereston, sed ... refoje pro nebuloj k.a. ni vidis nenion. Mi scias ke montoj troviĝas tie – ie!!**

**Mi ĝuis la ferion en Nepalo, speciale la renkontiĝon/vojaĝon kun la lokaj esperantistoj.**

**La nepalanoj ĝenerale estas tre afabla popolo, kaj malgraŭ la fakto ke ĉio estas malmultekosta por vojaĝantoj, oni ne ĝenas nin per ĉiama ”aĉetu, aĉetu”!**

**Mi miris kiel bone la novaj esperantistoj (90% el ili estas junuloj) regas la lingvon kaj klare prononcas Esperanton. Ili estas tre entuziasmaj kaj estus bone se AEA povus iom subteni kaj Nespan kaj Nejon, ĉar ilia financa stato estas preskaŭ nulo, la movado pli- malpli dependas de eksterlanda subteno. Mi rekomendas viziton al Nepalo por ĉiuj esperantistoj – vi ne bedaŭros tion!**

# Malmodernaj lavotagoj

**Nuntempe, se oni deziras fari la lavadon, oni devas nur puŝi butonon, kaj reveni post kiam la lavado estos finita.**

**En la 1930-aj jaroj tiaj aferoj estis tute aliaj.**

**Mia kompatinda patrino devis ĉiun lundan matenon ellitiĝi jam je la 5.30-a horo por ekbruligi la lignon sub la kaldronego. Tiam komenciĝis terura laboro, kiu daŭris la tutan tagon.**

**Nuboj da vaporo ĉirkaŭis ŝin dum ŝi luktis per torturiloj, kiuj terurus eĉ Torkemadon, la plej kruelan inkviziciestron hispanan. La iloj inkluzivis kuprobastonojn, sapbriketojn, amelon, lavbluaĵon, frotlavtabulon, kaj timindajn aferojn nomitajn kolandriloj. Infanaj fingroj ĉiam kaptatis en la kalandriloj. Tiam la infanoj devis iri al la porinfana malsanulejo en Adelajdo por kuracado.**

**Kaj post la longega pugnofrapado al la pezaj vestoj mia panjo devis porti ilin en la ĝardenon, kie ŝi fiksis ilin per tukpinĉiloj sur sekigŝnurojn. Ofte la lavitaĵo tiam falis en la koton, kaj mia panjo rekomencis sian Sizifan laboregon.**

**Multajn jarojn poste iu brila sudaŭstraliano nomata Hill, inventis la rondirantan vestsekigan ŝnuraron. Sed tio estis tro malfrua por mia patrino, bedaŭrinde!**

**La postan tagon Panjo havis la grandegan taskon gladadi la lavitaĵon.**

**Tial ne estas mirinde, ke ŝi estis tro laca por voĉlegi al mi dum la vespero!**

*Arturo Mortimer, la 15an de aprilo 2005*

# Pliboniĝas niaj kunvenoj

**Post la zamenhoffesto pliboniĝas niaj kunvenoj en Tynte Street. Ili nun, danke al ŝia moŝtino, Katja, estas multe pli amuzaj. Mi supozas ke la tialo estas, ke Katja invitis ĉiujn paroli pri si mem, kaj tio estas ja io, kion ĉiu ŝatas fari, ĉu ne?**

**La unuan kunvenon parolis Katja mem, ĉar ĉiu scivolis kian vivon ŝi havas. La duan kunvenon parolis Bob pri sia interesa vivo, kiu ankoraŭ daŭras. La trian kunvenon parolis – eĉ tre amuzege – Helena Palmer. La 4an de majo parolos Audrey, mi mem apenaŭ povas atendi. Venu do, vi ĉiuj, ni promesas al vi tre interesan kaj amuzan vesperon.**

**Sciu, ke ni okazigas ne nur vesperajn kunvenojn. Unu fojon ĉiumonate ni okazigas ankaŭ posttagmezan kunvenon, aŭ almenaŭ aranĝas ion. Aliĝu al nia societo kaj ekĝuu la vivon!!!**

# La 61a Junularkongreso de Tejo

**Prenu parton en la 61a internacia junularkongreso en Zakopano, en la altaj montoj, rokoj kaj verda arbaro en Polujo. Estas tie multaj ŝafoj, sed neniuj kuloj!**

**La temo de la kongreso estas ”Unueco en diverseco”. Por pli da informoj bonestu vin turni al: 61 IJK. Ireneusz Bobrzak, ul. Torunska 82 m 133, PL-03-226 Warszawa, Polujo, aŭ al <ijk@tejo.org.**

***Du stratpurigistoj forprenis paperaĉojn sur Nordteraso antaŭ la adelajda parlamentejo. Ĉiu el ili faris tion per longa stango sur kies fino estas fera pinto, iom simila al lanco, vi ĉiuj vidis ilin, ĉu ne?***

***Subite tiu el ili, kiu estas la plej observema, ekvidis pecon da uzita necesejpapero en la stratdefluejo. Li provis tuj kapti ĝin per la lanco, sed la vento estis eĉ pli rapida. Ĝi prenis la necesejpaperon, levis ĝin pli kaj pli supren, kaj fine enportis ĝin tra la malfermita fenestro de la oficejo de la ŝtatministro.***

***Nun tre timis la stratpurigisto. Li enkuris la parlamentejon kiom eble plej rapide por malebligi grandegan katastrofon. Kelkajn minutojn poste li elvenis ĝemante:***

***”Tro malfrue, li estis jam subskribinta ĝin...!”***

# Nova diskutlisto pri EU-konstitucio

**Ĉu jes, ĉe ne al la Eŭropunia konstitucio? Kial? Ni eŭropaj esperantistoj havas la grandegan ŝancon havi komunan lingvon! Mi do invitas vin uzi ĝin por debati pri nia komuna estonteco! Por aliĝi sendu ajnan mesaĝon al EU-konstitucio-subscribe@yahoogroups.com aŭ vizitu la ttt-ejon:http://groups.yahoo.com?group/EU-konstitucio/**

# Internacia mondcivitana adresaro 2005

**Internacia mondcivitana adresaro 2005 aperos kaj estos dissendata al ĉiuj en ĝi prezentitaj personoj la 1an de majo 2005. La Esperantlingvan klarigon pri la adresaro kaj la formularon-registrilon oni povas malfermi laŭ TTT-adreso:http://free-zg.t-**

**com.hr/cdm-hr/adresaro.htm Vi estas elkore invitataj senpage registriĝi en la adresaron, ĉiuj el vi, mondcivitanoj, mondfederaciistoj, sennaciistoj, homaranoj, hilelistoj, esperantistoj-internideanoj kaj simple mondskale amikemaj homoj. Ni planas dum venontaj jaroj pligrandigi la adresaron en Mondcivitanan Reton.**

# Himejio, Ĝemela urbo de Adelajdo

**Fine de majo okazos ekspozicio de internaciaj kulturoj en la japana urbo Himejio, ĝemeliĝinta urbo al Adelajdo. La urbestraro himejia jam invitis la lokajn geesperantistojn preni parton kaj ion kontribui al la ekspozicio.**

**La prezidanto de la loka Esperanto-Asocio, s-ro MINE Yositaka, skribis al la delegitoj de multaj malsamaj landoj, kie estas urboj ĝemeliĝintaj al Himejio petante, ke esperantistoj sendu mesaĝojn kaj salutojn en Esperanto al la ekspozicio. Sendu ilin, mi petas, per ordinara poŝto por ke ili estu ekspoziciataj kune kun multaj aliaj ekspoziciaĵoj pruvante ke transnacia amikeco eblas per Esperanto.**

**Bonestu sendi ilin al Harima Esperanto-Societo, s-ro MINE Yositaka, Kitahama-Kitawaki 29-16, Tasakato, JP-671-0122, Japanujo. Mine kaj mi elkore antaŭdankas vin!**

***Du vendistinoj en grandmagazeno estas malamikoj.***

***”Vi estas la plej granda idioto, kiun mi iam renkontis”, diras unu el ili.***

***La direktoro estis, hazarde, tre proksima. Diris li, ”Sinjorinoj, ĉu vi ne vidas, ke ankaŭ mi ĉeestas?”***